# Novjorka Prismo

Numero 139

Decembro 2004

**The Esperanto Society of New York invites you to its annual Zamenhofa Festo!**

When: Friday, December 17, 2004

Where: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A

Program: Buffet Dinner! Zamenhofaĵoj! Singing! Fun! Se vi deziras, alportu viajn rakontojn pri Zamenhof.
(Election of officers for the year 2005 at 7:30 pm)

Menu: Feel free to bring a main or side dish, dessert, or beverage to share. Please call Rochelle F. Grossman at 718-457-1490 to see what we need.



## Protokolo de la kunveno de la 19-a de novembro 2004

Antaŭ la kunveno, la ĉeestantoj diskutis pri interesaj temoj, kiel la fakto, ke la plimulto de fremdlingvoj uzas formon de la vorto "Esperanto" por aludi al nia lingvo. La escepto estas la ĉina, kiu uzas tri-silaban esprimon, kiu signifas "monda lingvo".

Je la sepa ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon.

Ĉeestis 16 personoj, inter ili tri personoj la unuan fojon.

Thomas DICKSON estas arkivisto por UFT. Li laboras en la konstruaĵo, kie ni okazigas niajn formalajn kunvenojn. Li eklernis pri Esperanto kiam li rigardis la filmon "Incubus" kun William Shatner.

Genrietta "Neeta" ORLEANSKAYA loĝas en la najbaraĵo de Alex KARKOVSKY. Ŝi estas kuracisto. Ŝi venas origine el Sankt-Peterburgo.

Valentina KOCINA estas aktiva Esperantistino kaj longtempa amikino de Sonja SOSKINA. Ŝi nun restas kun Sonja kaj ŝia familio.

Tomaso esprimis bedaŭron, ke la *Prismo* denove enpoŝtiĝis malfrue. Li emfazis, ke ne kulpas la protokolisto, kiu plej ofte sendas la protokolon al li kaj al la redaktoro nur unu aŭ du tagojn post la kunveno. Multaj ĉeestantoj ne havis la okazon tralegi la protokolon antaŭ la kunveno. Ili ne povis kontroli ĝin por eraroj. Tamen, almenaŭ unu aŭ du personoj diris, ke la protokolo estu akceptata sen ŝanĝoj, do la protokolo estis akceptata sen ŝanĝoj. George BAKER rimarkis, kaj ŝerce diris, ke pli da personoj ĉeestas la kunvenon kiam la *Prismo* enpoŝtiĝas malfrue.

La Kandidatiga Komitato finis sian laboron. Jeff BLAKESLEE, ĉefo de la komitato, anoncis la kandidataron por la venonta jaro. Prezidanto: Stuart GREEN; Vicprezidanto: Tomaso ECCARDT; Korespondа Sekretariino: Rochelle F. GROSSMAN; Kasistino: Sofiya SOSKINA; Protokolisto: Jeff BLAKESLEE; Programdirektorino: Maki SANO; Redaktoro de nia novajletero: Jim MEDRANO.

Tomaso anoncis, ke la komencanta kurso en Esperanto rekomenciĝos sabaton, la 20-an de novembro, je 1:30 ptm, ĉe la restoracio Emma's Dilemma.

Tomaso anoncis, ke Ulrich BECKER, eldonisto kaj ano de nia klubo, verkis libron de poemoj "Ĉiuj Dioj Estas For". Sonja pruntoprenis la libron.

---- daŭras je paĝo 2

## IBM Plaza

La 5-an de decembro plimalpli dek ESNY-klubanoj neformale kunvenis ĉe IBM Plaza en la mezurba Novorko. Ni priparolis ĝangalo.com kaj Leo Tolstoj. Pilar Rau iomete filmis nin por sia kurso, sed la gardistoj malpermisis tion.

# Protokolo daŭrigita (de paĝo 1)

Rochelle anoncis, ke ŝi havas du tolajn sakojn de ELNA, kaj ŝi ofertis ilin al iuj ajn, kiuj volas havi ilin. Neniu volis preni ilin, do ŝi reprenis ilin.

Rochelle anoncis, ke ŝi ricevis poŝtkarton de la Esperanto-Societo de Novanglujo, invito por ĉeesti Zamenhofan Feston en Cambridge, Massachusetts.

Maki anoncis, ke Marta BERGONZOLI resaniĝas post kirurgio de la dekstra piedo, kaj ke Marta esprimis bondeziron por la klubanoj dum la festotagoj. Maki ankaŭ anoncis, ke Tomaso LEONG informis ŝin, ke li ne deziras daŭre esti vicprezidanto de nia Societo.

Tomaso anoncis, ke ĉe la decembra kunveno okazos nia Zamenhofa Festo, kaj se vi intencas kunporti manĝaĵon, bonvolu informi al Rochelle pri kio ĝi estas, por ke ni ne ĉiuj kunportu la saman manĝaĵon.

Stuart GREEN anoncis, ke li, Semra ÇELIK, Pilar RAU kaj Jeff BLAKESLEE akompanis Chuck SMITH je vizito al la Polgar Chess Center en Forest Hills, en Queens, post la neformala kunveno de la 7-a de novembro. Susan POLGAR estas unu el la plej fortaj ŝakmajstroj de la mondo, kaj ŝi estas membro de nia klubo. La centro havas tablojn, librobretojn kaj oficejon. Ni renkontis Susan kaj parolis kun ŝi dum 15 minutoj. Chuck enkondukis nin al sia revo: starigi Esperanto-centron en Novjorko, simila al la Polgar Chess Center kaj la Esperanto-centro en Calgary, Alberta, en Kanado. Post kiam ni lasis la Polgar Chess Center, ni vespermanĝis ĉe la greka restoracio Corfu, kie Chuck montris al ni informilon pri la organizaĵo "Esperanto Antaŭen", kiu proponas starigi Esperanto-centrojn tra la tuta nordamerika kontinento. Estas multe pli multekoste ol nia nuna klubo, sed ĝi estas interesa revo.

Maki anoncis, ke ŝi ricevis mesaĝon de japana Esperantistino pri artikolo pri rekord-posedanta baspilkoludisto Ichiro.

Je 7:35 ptm, Alex KARKOVSKY komencis prelegeton pri Zamenhof. La fondinto de la movado ne volis, ke la movado estu "kulto de personeco". Li ne estis religie observema judo. Li ne estis cionisto. Li ne pensis, ke la jida povas esti la internacia lingvo eĉ inter judoj, ĉar eĉ multaj judoj ne parolas la jidan. Li ne pensis, ke la hebrea povas esti la internacia lingvo, ĉar la lingvo estas tre malnova. Alex ankaŭ menciis, ke Lenin unufoje ĉeestis Esperanto-kongreson. Per la uzo de aliaj nomoj, Zamenhof kaŝis sian identon, kaj ankaŭ la fakton, ke li estas judo.

Je 8:08 ptm, Maki SANO komencis prelegi pri sia eko-vojaĝo al Svedio kaj Danlando, kaj pri rimedoj uzataj tie por konservi energion. Ŝi montris bildon de necesejа cisterno kun du sekcioj, unu por likvaĵo, kaj la alia por solida materialo. Alia bildo montris rubujon kun tri sekcioj. Alia bildo montris aron da 20 ventomuelioj en la Balta Maro. Maki vizitis urbojn, kiuj havis bonegajn amasotransportosistemojn. La patro de Maki donis prelegon en la angla en Svedio pri alternativaj fontoj de energio. Maki disdonis paperon, kiu montras la procentojn uzatajn en 9 landoj de diversaj fontoj de energio.

Je la naŭa ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Tuj poste, 8 el la 16 ĉeestantoj iris al la restoracio *Cafe World* por manĝi kaj trinki.

Protokolis: Stuart GREEN

## Societa Kalendaro

**Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!**
**Metu tiujn datojn en vian kalendaron**

**17-a de decembro**
Zamenhofa Festo
Buffet Dinner; elections
Friday, 6:30 pm at UFT

**2-a de januaro de 2005**
Tagmanĝo
Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM

**21-a de januaro**
ESNY KUNVENO
Vendredo, 6:30 ptm ĉe UFT

**United Federation of Teachers (UFT)**
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

# Esperantisto venos al Novjorko

Saluton, geesperantistoj! Mi nomiĝas Chuck Smith kaj mi nun serĉas laboron kiel komputila programisto en Novjorko. Mi estas plej konata inter la esperantistaro kiel la fondinto de Vikipedio kaj komitatano-A de TEJO por Usono. Se vi konas iun, kiu volas "entry-level" komputiliston, bonvolu kontakti min ĉe <amuzulo@gmail.com>. Mia vivresumo troviĝas ĉe http://www.amuzulo.net/resume.htm. Cetere, mi volas translokiĝi al Novjorko por daŭrigi mian laboron kiel reprezentanto de UEA ĉe UN, do mi ankaŭ serĉas malmultekostan loĝejon. Antaŭdankegon pro via helpo.

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017
(212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Novjorka Prismo
Numero 139 -Decembro 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo